
# La Japana Budhano

Bulteno de Japana Budhana Ligo Esperantista

N-ro 393/ 2561 (2018)



*Tōdai-ji,* Halo de Granda Budho

## La Budhismo en Nara

speciala eldono por la dua Komuna Esperanto-Kongrso de Japanio kaj Koreio - Nara

# Enhavo


**Historieto de Budhismo en Antikva Japanio**

1. Alveno de Budhismo ..................3
2. Princo *Shōtoku* ..................4
3. la Restaŭro de *Taika* ..................6
4. La Ses Skoloj de Nara, la Suda Metropolo ..................7

**Budhismaj Temploj en *Nara***
(ordigitaj laŭ fondojaro)

*Asuka-dera*（飛鳥寺） ..................10
*Gangō-ji*（元興寺） ..................11
*Hōryū-ji*（法隆寺） ..................12
*Chūgū-ji*（中宮寺） ..................13
*Taima-dera*（當麻寺） ..................15
*Hōrin-ji*（法輪寺） ..................16
*Hokki-ji*（法起寺） ..................17
*Daian-ji*（大安寺） ..................17
*Kōfuku-ji*（興福寺） ..................18
*Yakushi-ji*（薬師寺） ..................21
*Kimpusen-ji*（金峯山寺） ..................23
*Oka-dera*（岡寺） ..................23
*Tōdai-ji*（東大寺） ..................24
*Hase-dera*（長谷寺） ..................27
*Tōshōdai-ji*（唐招提寺） ..................28
*Saidai-ji*（西大寺） ..................29
*Murō-ji*（室生寺） ..................30
*Akishino-dera*（秋篠寺） ..................32
*Chōgaku-ji*（長岳寺） ..................33
*Chōgosonshi-ji*（朝護孫子寺） ..................33

**Postparolo** ..................35

# Historieto de Budhismo en Antikva Japanio

## *1. Alveno de Budhismo*

Laŭ "Kroniko Japana", oficiala historio de la antikva Japanio, kompletigita en 720, budhismo alvenis al Japanio la 13an de oktobro 552. Sed alia kroniko skribas, ke ĝi alvenis pli frue en 538. Kvankam estas debatoj rilate la oficialan alvenon de budhismo, ĉiuokaze tre verŝajne ĝi estis alportita pli frue fare de privatuloj.

Tiutempe el koreaj landoj (*Kogurjo*, *Baekje*, kaj *Silla)* kaj el ĉinaj landoj venis multe da homoj al Japanio transmare, kun diversaj celoj, kaj ili alportis teknikojn kaj kulturaĵojn, inter kiuj estis ankaŭ budhismo. Ekzemple, *Siba Datto* (oni ne estas certa, el kiu lando li devenis) alvenis al Japanio en 522, kaj li private starigis etan preĝejon kun budha statueto. Cetere, lia filino *Zenshin-ni* poste fariĝis la unua bikŝuino (monaĥino) agnoskite de la japana ŝtato, kaj lia nepo *Kuratsukuri-no-Tori* estis fama skulptisto de budha statuo.

Estas certe, ke *Seong*, la reĝo de *Baekje*, donacis budhan statuon kaj sutrojn al la 29a imperiestro *Kinmei* en la mezo de la 6a jarcento.

Sed ne ĉiuj korteganoj bonvenigis budhismon. Japanoj ne povis distingi Budhon disde indiĝenaj dioj, kiujn ili adoris ĝis tiam. (Tio estas tute natura; ankaŭ nuntempuloj ne bone distingas la du.) Ili rigardis Budhon kiel fremdan dion. Unuj opiniis, ke Budho havas pli da potenco mistera kaj superhoma ol japanaj dioj, kaj ke la kortego devas oficiale adori Budhon. Aliaj kontraŭis tion, ĉar ili timis, ke enkonduko de fremda dio kaŭzas koleron de japanaj dioj kaj sekve katastrofon. Ĉiuokaze tiamaj japanoj ne povis kompreni, kio estas budhismo.

Inter korteganoj la Familio *Soga*, kies potenco havis rilaton kun koreoj, subtenis budhismon, dum la Familioj *Mononobe* kaj *Nakatomi* kontraŭis ĝin kaj postulis forĵeti la budhana statuon alportitan de *Beakje*. Probable la afero estis multe pli komplika ol prireligia debato; politika konflikto rilate hegemonion certe estis implikita. Imperiestro *Kinmei* finfine inklinis al kontraŭbudhismaj korteganoj.

Kiam la 31a imperiestro *Yōmei* grave malsaniĝis kaj estis sur la lito de

morto, li ekinteresiĝis pri budhismo, ĉar japanaj indiĝenaj dioj, laŭdire, ne emas rilati al malsano kaj morto. Tio estas unu malavantaĝo de japana tradicia ŝintoismo, kaj samtempe ĝuste en tio japanoj sentis necesecon de nova religio - budhismo. Do, en la komenco oni atendis de budhismo la rolon kiel misteran kuracilon.

En 587 la Familio *Soga* milite pereigis la Familion *Mononobe*. Post tio neniu kontraŭis akcepti budhismon kiel ŝtatan religion. La templo *Asuka-dera*, kiu estis la unua impona templo en la urbo *Asuka*, tiama ĉefurbo dum la *Asuka*-epoko (592-710), estis konstruita de la Familio *Soga*, por ke ĝi gajnu la batalon kontraŭ *Mononobe*.

Tiutempe budhismo estis subtenata nur de parto da korteganoj aŭ aristokratoj, sed neniel fariĝis popola religio.

## *2. Princo Shōtoku*

Kiam la 33a imperiestrino *Suiko* surtroniĝis, Princo *Shōtoku* (574-622)[1], filo de *Yōmei*, fariĝis ŝia regento.

Li, kiel talenta politikisto, deziris regi la landon sub la principo de centralizismo kun imperiestra prestiĝo kaj celis ŝtaton kun alta moralo. Li konatiĝis kun la eminenta bikŝuo (monaĥo) *Hjeja* el *Kogurjo*, kiu informis lin pri progresinta politika sistemo kaj budhismo en la *Sui*-dinastio, Ĉinio. Al *Shōtoku* tiama ĉina politiko kaj kulturo ŝajnis ideala.

En 604 *Shōtoku* proklamis la Konstitucion el 17 artikoloj. Kompreneble ĝi ne estis tia, kia estas la moderna konstitucio, kiu difinas la rilaton inter registaro kaj popolo; ĝi estis miksaĵo de morala kodo kaj administracia juro. Jen estas la komenca parto el la Konstitucio[2].

1. Harmonio estas esenca, kaj indulgemo estas grava. Ĉiu homo havas partiemon, kaj la grandanimaj estas malmultaj. Tial, jen unuj ne obeas al la suverenco aŭ la patro, jen aliaj malpacas kun la najbaroj. Sed, se la supro kaj la malsupro harmonias inter si, kaj

[1] Pri lia historia realeco kelkaj historiistoj dubas. Kaj lia vera nomo estis *Umayado*. Sed multaj japanoj, escepte de lastatempaj lernejanoj, jam kutimiĝis al la nomo *Shōtoku*.

[2] el "La Kodo de Kronprinco Ŝootoku", tradukita de *Cuna Takaiŝi*, 1932, Japana Budhana Ligo Esperantista.

akordas reciproke ĉe diskutoj, la aferoj glite iras per si mem, kaj nenio nefarebla.

2. Tutkore adoru la Tri Trezorojn. La Tri Trezoroj estas la Budao, la Darmao kaj la Sangao. Tio estas la fina rifuĝejo de la tuta vivantaĵaro, kaj la fundamenta normo por ĉiuj popoloj. Tial, neniam kaj de neniu, tio ĉi estas nerespektata. Homoj vere malbonaj apenaŭ ekzistas. Tial bona instruado influas. Tamen, se ne laŭ la Tri Trezoroj, laŭ kio eraroj povus esti korektataj?



El ĉi-supra teksto estas videble, ke *Shōtoku* alprenis la ideon de budhismo kiel la principon de ŝtata unueco. *Shōtoku* havis la du vizaĝojn: tiun de politikisto kaj de ideologo.

Li estas ofte laŭdata kiel "la patro de japana budhismo". Efektive li fondis aŭ iniciatis kelkajn gravajn templojn, inkluzive de *Hōryū-ji* (en *Nara*) kaj *Shitennō-ji* (en *Ōsaka*)

En pli posta tempo japanoj, interalie metiistoj, komencis sanktigi lin kaj adori lin kiel avataron de Avalokiteŝvaro. En ne malmultaj temploj troviĝas specialaj domoj por adori la statuon de *Shōtoku*.

Restas multaj legendoj pri liaj agadoj kiel tiuj de budhisma ideologo. Ĉu ili estas veraj aŭ ne, estas debatoj. Inter ili notinde estas, ke li verkis komentariojn de la tri sutroj: Lotusa Sutro (法華経), Sutro de *Ŝrimaladevi* (勝鬘経), Sutro de *Vimalakirti* (維摩経). Alia legendo estas pri la "Teksaĵa Mandalo de Sukavato", kiu estas nacia trezoro kaj konservata en *Chūgū-ji*, apuda templo de *Hōryū-ji.* Laŭ ĝia enskribita teksto, ĝi estis farita sub la ordono de *Tachibana-no-Ōiratsume*, edzino de *Shōtoku*, memore al lia forpaso. Ĝi enhavas la tekston el broditaj literoj kaj tie oni legas la frazon: LA MONDO ESTAS FALSA, LA BUDHO SOLA ESTAS VERA (世間虚仮唯仏是真). Se tiu ĉi frazo estas de *Shōtoku* mem, oni povus kompreni, ke li vere estis budhano profunde komprenanta la ideon de budhismo, kaj ne nur politikisto kiu utiligis ĝin por ŝtata unueco.

## *3. la Restaŭro de Taika*

Post la forpaso de *Shōtoku*, la Familio *Soga* pli kaj pli fortigis sian potencon, kiu eĉ superis tiun de imperiestro. Pro tio kelkaj el la imperiestra familio kaj aliaj korteganoj sentis krizon, kaj ili komplotis moritigi *Soga-no-Iruka*, la ĉefo de la familio. En 645 li estis mortigita. La vera motivo de la konflikto inter la Familio *Soga* kaj aliaj korteganoj estas enigma, kaj historiistoj daŭrigas debatadon rilate tiun ĉi aferon.

Ĉiuokaze ekde tiam komenciĝis diversaj reformoj en la regsistemo en Japanio, kion oni nomas "la Restaŭro de *Taika*".[3] Ekzemple: ĉiuj popolanoj estis registritaj kaj devigitaj pagi imposton rekte al la centra registaro; aristokratoj havis pli da potenco ol ĝisnunaj regionaj potenculoj, kaj inter ili estis strikta distingo de rango kaj ofico; anstataŭ arbitra maniero de potenculoj klara politiko surbaze de leĝaro estis enkondukita. Dum tiu ĉi restaŭro la nomo de la regno estis oficiale decidita: Japanio (日本), kiun *Shōtoku* jam antaŭe uzis.

La restaŭro estis esence bato kontraŭ *Soga*, kiu havis intiman rilaton kun korea potenco, kaj kies religio estis budhismo. Progreso de la restaŭro sekve kaŭzis re-oficialigon de ŝintoismo en la imperiestra familio, kio ankoraŭ nun daŭras. La rilato inter ŝintoismo kaj budhismo estis tiutempe iom komplika. La 40a imperiestro *Tenmu* solvis tiun ĉi komplikecon: ŝintoismo estu la religio de la imperiestra familio, kaj budhismo estu ŝtata religio. Fakte *Tenmu* donis favoran politikon al budhismo. Ekzemple li ordonis, ke ĉiu familio havu budhan altaron. Fakte dum la regna periodo de *Tenmu* multaj temploj estis konstruitaj. Aliflanke li postulis de bikŝuoj koncentriĝi al preĝo por la bono de imperiestro kaj ŝtato, malpermesante ilian liberan agadon, kaj protektante metis ĉiujn templojn kaj bikŝuojn en la administradon de la ŝtato. Tio signifis, ke budhismo, kies origina prestiĝo estas en la tri trezoroj (budho, darmo, samgo) kaj nenio alia, subiĝis al la prestiĝo de imperiestro. Esence estis malvenko de budhismo.

---

[3] Taika (大化) estas en Japanio la unua regna erao, kies sistemo estis inventita en Ĉinio. La regna erao ankoraŭ daŭras en Japanio; la nuna estas Heisei (平成). Kiam imperiestro ŝanĝiĝas, ankau regna erao ŝanĝiĝas. En pli frua tempo, ne nur ŝanĝiĝo de imperiestro sed ankaŭ katastrofo aŭ eĉ arbitro de reganto motivis ŝanĝiĝon de erao.

## *4. La Ses Skoloj de Nara, la Suda Metropolo*

Unu el la trajtoj de japana budhismo estas en tio, ke ĝi havas multajn skolojn kaj subskolojn. Tradiciaj skoloj nombras entute 13, kiuj dividiĝis per idea kaj metoda aspektoj. Oni klarigas tion ĉi ofte jene: la celo estas sama, sed pluraj vojoj troviĝas por atingi la celon. La ĉefaj skoloj dividiĝis plu en subskolojn pro diversaj kialoj, ekzemple konflikto pri hegemonio, malsama opinio pri instruo, geografia oportuneco k.t.p. Ĉiu (sub)skolo havas sian propran organizan sistemon, kaj preskaŭ ĉiuj temploj, bikŝuoj, pastroj kaj laikaj kredantoj apartenas al iu specifa (sub)skolo. Tiel nun ĉiuj (sub)skoloj estas sendependaj inter si, kvankam multaj el ili, nuntempe 59, aliĝas al unu tutjapana federacio.

Sed en antikva tempo, nur ses skoloj troviĝis kaj ili estis ne tiel klare dividitaj kaj sendependaj. Unu bikŝuo studis paralele plurajn skolojn kaj ne havis la konscion pri aparteneco. Kiam la japana metropolo translokiĝis al Kioto, ĝistiama metropolo *Nara* estis nomita "suda metropolo". Tial "la ses skoloj de la suda metropolo" signifas budhismojn diverstendencajn, kiuj aktivis antaŭ kaj dum la *Nara*-epoko.

Jen konkrete la ses skoloj.

1. **Girlandismo** (***kegon-shū***, 華厳宗): Fondita de *Dushun* (杜順), kiu aktivis en *Xi'an*, Ĉinio. Ĝi baziĝas sur la Girlanda Sutro (華厳経), kaj instruas, ke en la reala mondo ĉiuj fenomenoj estas interrilataj, ke ni povas eniri en la veron trapasante la kvar darmajn sferojn (tiun de fenomenoj, de principo, de fenomenoj kaj principo, de fenomenoj kaj fenomenoj). *Shinshō* (審祥), kiu studis en Koreio kaj Ĉinio, alportis ĝin al Japanio en 736. La centra templo estas *Tōdai-ji*（東大寺）. Nun 110 temploj apartenas al tiu ĉi skolo.

2. **Konsciismo** (***hossō-shū***, 法相宗): Fondita de *Kuiji* (窺基), disĉiplo de *Xuanzang* (玄奘), fame konata pro multege da sutrotradukoj. Ĝi heredas la hind-devenan skolon "konsciismo" aŭ "jogo-praktikado" (瑜伽行唯識学派), kiu estis fondita de *Maitreya* (弥勒, ne la futura Budho, sed reala persono) kaj disvolvita de *Asanga* (無着) kaj *Vasubandhu* (世親). Ĝi emfazas, kiel ĝia nomo montras, la pensmanieron de ideismo kaj la praktikon de meditado.

En 653 *Dōshō* (道昭), kiu post sia studo en Ĉinio sub la gvido de *Xuanzang*, alportis la skolon al Japanio, kaj poste pluraj bikŝuoj studintaj en Ĉinio kontribuis por disvastigi la instruon. La centraj temploj estas du: *Kōfuku-ji* （興福寺）kaj *Yakushi-ji* （薬師寺). Antaŭe ankaŭ *Hōryū-ji* （法隆寺）estis centra templo, sed en 1950 ĝi sendependiĝis de la skolo kaj formis alian branĉon nomatan *shōtoku-shū* (聖徳宗). Nun al *hossō-shū* apartenas 177 temploj kaj al *shōtoku-shū* apartenas 24.

3. **Vinajismo** (***ritsu-shū*** aŭ ***ri-sshū***, 律宗): Tiu ĉi skolo celas studi kaj praktiki vinajon, unu el la tri kategorioj de la budhisma kanono. Troviĝas diversaj vinajoj laŭ diversaj skoloj; *ritsu-shū* baziĝas interalie sur la vinajo tenata en la skolo *Dharmagupta* (法蔵部) en antikva Hindio. En Ĉinio *Daoxuan* (道宣) establis la skolon. Dume en Japanio dum multaj jaroj oni ne sciis la ortodoksan vinajon, kio signifis, ke ĝistiamaj japanaj bikŝuoj ne estis ortodokse agnoskitaj, ĉar por fariĝi bikŝuo estas necese lerni kaj akcepti preceptojn priskribitajn en vinajo. Tial Imperiestro *Shōmu* deziris inviti iun ĉinan bikŝuon, kiu povas doni preceptojn, t.e. formale sankcii novicojn kiel bikŝuojn. Responde venis *Jianzhen* (鑑真), kiu post 5 fojoj da malsukcesoj transiri la maron kaj blindiĝo finfine venis al Japanio en 754, kaj fariĝis la fondinto de la japana vinajismo. La centra templo estas *Tōshōdai-ji* (唐招提寺). 28 temploj apartenas al la skolo.

**3′. Mantra Vinajismo** (***shingon-ri-sshū***, 真言律宗): Alia fluo de vinajismo. Nome, *Eison* (叡尊) kaj lia disĉiplo *Ninshō* (忍性) en la *Kamakura*-epoko, vidinte malprosperon de vinajismo, deziris revigligi vinajan tradicion, ne simple reirante al la originala formo sed enkondukante aliajn vinajojn tenatajn en aliaj skoloj kaj kombinante ĝin kun mantrismo (真言宗), al kiu ili tiam apartenis. Kvankam tiu ĉi skolo naskiĝis en la *Kamakura*-epoko, la centra templo *Saidai-ji* (西大寺) troviĝas en *Nara* kaj la etoso heredas *Nara*-budhismon, tial estus taŭge klarigi pri ĝi ĉi tie.

Ĉi-subaj tri skoloj, malsame kiel la supre menciitaj tri skoloj, ne formas memstaran organizon. Nome, ili ne posedas centran nek branĉajn templojn, sed kiel pure akademiaj studobjektoj estas studataj de aliskolaj bikŝuoj. La komunaj karakteroj de ili estas, ke ili baziĝas ne sur sutro sed sur traktato verkita de hinda majstra bikŝuo de diversaj antikvaj skoloj.

4. **Ŝunjatismo** (***sanron-shū***, 三論宗): Ŝunjato estas grava nocio de mahajana budhismo. Nagarĝuno (*Nāgārjuna*, 龍樹), unu el la plej gravaj budhanaj filozofoj, emfazis tiun ĉi nocion, kiu estas preskaŭ ekvivalenta al sen-ento. Kune kun lia disĉiplo *Āryadeva* (聖提婆) , li estas konsiderata kiel la iniciatinto de la skolo *Madhyamaka* (中観派). En Ĉinio anoj de tiu ĉi skolo precipe studis la tri traktatojn: *Mūlamadhyamaka kārikā* (中論), *Dvādaśanikāya Śāstra* (十二門論), *Śata śāstra* (百論). La nomo de tiu ĉi skolo (三論宗, laŭlitere la skolo de la tri traktatoj) devenis de tiu ĉi fakto. La fondinto estas *Jizang* (吉蔵) en Ĉinio. En Japanio ĉefe bikŝuoj de la temploj *Gangō-ji* (元興寺) kaj *Daian-ji* (大安寺) studis ĝin

5. **Entismo** (***kusha-shū***, 倶舎宗): Post la forpaso de Ŝakjamunio la samgo dividiĝis en 2 skolojn, kaj pli poste ankoraŭ en 20 skolojn; inter ili la plej influhava estis *Sarvāstivādin* (説一切有部), kiu asertis, ke ĉiuj ekzistaĵoj - materialajn, mensajn, funkciajn k.t.p. - povas esti listigitaj laŭ 75 kategorioj, kiuj mem estas entoj aŭ substancoj, neniel estiĝantaj nek malestiĝantaj. *Vasubandhu,* antaŭ sia konvertiĝo al konsciismo, studis la dogmon de tiu ĉi skolo kaj ankaŭ tiun de la alia skolo *Sautrāntika* (経量部), kaj verkis la gravan traktaton *Abhidharma-kośa-bhāṣya* (阿毘達磨倶舎論). La skolo *kusha-shū* celas studi tiun ĉi traktaton, tial oni povus diri, ke ĝi estas heredanto de la du skoloj en Hindio, kiuj inklinas al aprobo de entoj kaj estis severe kritikitaj de Nagarĝuno.

6. **Harivarmanismo** (***jōjitsu-shū***, 成実宗): *Harivarman*, hinda majstro, studis la dogmon de *Sarvāstivādin* kaj *Mahāsāṃghika* (大衆部), transiris al *Sautrāntika*, kaj verkis la traktaton *Satyasiddhi-śāstra* (成実論). Tiu ĉi skolo, kies celo estas studi la verkon, same kiel ĉi-supra Entismo, heredas la abidarman budhimon[4] en Hindio. *Harivarman* tamen ne aprobis enton kaj asertis ke ekzistaĵoj estas sen-enta. Unuvorte dirite, li staras ĉe la mezo inter Ŝunjatismo kaj Entismo.

[4] Abidarmo estas etimologie “pri-darmo”; preskaŭ sama al la aro de la dividiĝintaj 20 skoloj, kiuj oni antaŭe nomis “hinajano” (malgranda veturilo, 小乗) sur la starpunkto de mahajano. Sed strikte dirite, mahajano reprezentata de Nagarĝuno ĉefe kritikis *Sarvāstivādin.* La nuna teravada budhismo (上座部) en Suda Azio ne rekte rilatas al *Sarvāstivādin* nek al *Sautrāntika.*

# Budhismaj Temploj en Nara

(ordigitaj laŭ fondojaro)

## *Asuka-dera*（飛鳥寺）
alinome ***Hōkō-ji***（法興寺）

❖**skolo**: Mantrismo (*shingon-shū, buzan-ha*)

❖**ĉefadorato**: Ŝakjamunio

❖**fondojaro**: 593 (?)

❖**fondinto**: *Soga-no-Umako*

❖**historio**

Kiam en 588 *Baekje* (sudokcidenta Koreio) donacis relikvon de Ŝakjamunio al Japanio, *Soga-no-Umako* ekdeziris konstrui templon por adori la relikvon. Tiel ĝi ne estis ŝtata sed privata templo de la Familio *Soga*, potenca protektanto de budhismo. La plej malnova templo, kiu konsistis el pagodo, tri haloj, lekciejo, pordo kaj klostro.

Kiam ĉefurbo translokiĝis al *Nara*, ankaŭ tiu ĉi templo translokiĝis kun siaj konstruaĵoj kaj ŝanĝis sian nomon al *Gangō-ji* (元興寺), sed la ĉefadorata statuo sola restis ĉi tie. La nuna ĉefhalo estis rekonstruita en 1828.

❖**vidindaĵoj**

✓**Granda Budho de *Asuka*** (*Asuka-Daibucu*): Statuo de Ŝakjamunio, sidanta, 2.8m alta. La plej malnova Budha statuo en Japanio. Por fari la statuon, fremda teknikisto nomata *Kuratsukuri-no-Tori* (laŭlitere: *Tori*, fabrikisto de selo) estis invitita. La ovala vizaĝo kaj la okuloj migdalformaj karakterizas la stilon de tiu ĉi tempo.



# *Gangō-ji*（元興寺）

❖**skolo**: Mantra Vinajismo (*shingon ri-sshū*)

❖**ĉefadorato**: Mandalo de Sukavato

❖**fondojaro**: 593 (?)

❖**fondinto**: *Soga-no-Umako*

❖**historio**

Potenculo *Soga-no-Umako* fondis budhisman templon *Hōkō-ji* en la regiono *Asuka*, tiama ĉefurbo. La templo havis 1 pagodon kaj 3 halojn. Antaŭ tio ne estis tiel grandskala templo en Japanio. En 710 *Nara* fariĝis ĉefurbo, kaj la templo translokiĝis tien. Tiam la nomo de la templo fariĝis *Gangō-ji*. (vd. ankaŭ la antaŭan *Asuka-dera*.)

En *Nara*-epoko (710-794) la templo estis tiel granda kiel *Tōdai-ji* kaj *Kōfuku-ji*. Sed en postaj epokoj iom post iom ĝi malprosperis. Konstruaĵoj rompiĝis kaj estis lasitaj.

La templo havas pentraĵon de Sukavato (Pura Lando de Amitabo), nomata *Chikō*-mandalo. Ĝi estis pentrita gvidite de *Chikō*, bikŝuo en *Nara*-epoko. En postaj epokoj, kredo al Amitabo populariĝis, kaj *Chikō*-mandalo fariĝis ĉefadorato de la templo. Oni nomis la konstruaĵon, kiu ĝin havas, *Gokuraku-bō*, Domo de Sukavato, nun *Gokuraku-dō*.

❖**vidindaĵoj**

- ✓**Domo de Sukavato** (*Gokuraku-dō*) : Ĝi havas stilon de *Kamakura*-epoko (1192 - 1333). Nacia trezoro.
- ✓**Ĉambro de Zeno** (*Zenshitsu*): Eksa loĝejo de bikŝuoj. Stilo de *Kamakura*-epoko. Tiuj ĉi 2 kostruaĵoj havas malnovajn tegolojn sur tegmentoj. Oni pensas, ke ili estis faritaj en komenco de la templo.
- ✓**Orienta Pordo** (*Tō-mon*): Stilo de *Kamakura*-epoko. Translokita de *Tōdai-ji* en la fino de la 14a jarcento aŭ komenco de la 15a jarcento. Grava kulturaĵo.
- ✓**Malgranda Kvin-etaĝa Pagodo**: Konstruita en *Nara*-epoko, tute same kiel grandaj turoj. Ĉirkaŭ 5.5m alta. Nacia trezoro.

# *Hōryū-ji*（法隆寺）

❖**skolo**: Konsciismo (*shōtoku-shū*[5])

❖**ĉefadorato**: Ŝakjamunio

❖**fondojaro**: 607

❖**fondinto**: Princo *Shōtoku*

❖**historio**

Kiam Imperiestro *Yōmei* grave malsaniĝis, li votis konstrui budhisman templon dezirante sian resaniĝon, sed li ne povis realigi sian revon. En 607 Princo *Shōtoku*, filo de Imperiestro *Yōmei*, fondis *Hōryū-ji* en *Ikaruga*, *Nara* gubernio. *Hōryū-ji* konsistas el du grupoj da konstruaĵoj: la okcidentaj kaj la orientaj. La okcidentaj estas la plej malnovaj lignaj konstruaĵoj en la mondo. En 1993 *Hōryū-ji* kaj *Hokki-ji* (法起寺) aldoniĝis al la listo de Monda Heredaĵo de Unesko. *Hokki-ji*, situanta nordoriente de *Hōryū-ji*, estis fondita en 638 de *Yamashiro-no-Ōe-no-Ō*, filo de Princo *Shōtoku*.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Kondō*): En ĝi staras la tri bronzaj statuoj: la Budhoj Ŝakjamunio, *Baiŝaĵaguru* (*Yakushi-nyorai*)[6] kaj Amitabo. Sur la interna muro estis pentritaj diversaj budhismaj pentraĵoj. En 1949 la murpentraĵoj forbrulis pro akcidenta fajro, sed en 1968 famaj pentristoj kompletigis reprodukti ilin.

✓**Kvin-etaĝa Pagodo** (*Gojū-no-tō*): Ĝi estis konstruita por adori relikvon de Ŝakjamunio. 31.5m alta. En la teretaĝo troviĝas kvar grupoj da argilaj statuoj, kiuj prezentas famajn budhismajn scenojn.

- **sceno en orienta flanko**: dialogo inter Bodisatvo *Manjushri* (*Monju-bosatsu*)[7] kaj *Vimalakirti* (*Yuima-koji*)
- **sceno en okcidenta flanko**: divido de la relikvo de Ŝakjamunio
- **sceno en suda flanko**: prediko de Amitabo
- **sceno en norda flanko**: funebra ceremonio de Ŝakjamunio

✓**Okangula Halo** (*Yumedono*)**:** En 739 *Gyōshin*, altranga bikŝuo de *Hōryū-ji* konstruis ĝin por adori Princon *Shōtoku*. En la centro staras la

---

[5] 聖徳宗. En 1950 ĝi sendependiĝis de *hossō-shū*

[6] La Budho de medicino, kiu havas en sia mano medikamentujon. 薬師如来

[7] La Bodisatvo asociita kun saĝo en Mahajana Budhismo. 文殊菩薩

Avalokiteŝvaro Mondo-savanto (*guze-kannon*). Dum longa tempo neniu povis vidi ĝin, ĉar ĝi estis sekreta statuo. En 1884 *Ernesto Francisco Fenollosa* kaj *Okakura Tenshin* levis ĝian vualon, kiam ili esploris kulturajn hered-aĵojn.



✓**Halo de trezoroj** (*Daihōzō-in*): Muzeo konstruita en 1998 por ekspozicii diversajn trezorojn de *Hōryū-ji*. En la centra ĉambro staras la Avalokiteŝvaro el *Baekje* (*kudara-kannon*), majstraĵo de ligna statuo de *Asuka*-epoko. 210cm alta. Alia trezoro estas *Tamamushi*-tabernaklo, kiu estas fama pro ĝia ornamo de kelkmil flugiloj de la krizoĥroo (*Chrysochroa fulgidissima*). Ni havas du replikojn: la unua farita en 1960 de Lepidopterologia Societo de Japanio, la alia farita en 2008 de *Nakada Kinta*.

✓**Centra Pordo** (*Nandai-mon*): Ĉe ambaŭ flankoj staras du statuoj de vaĝrapanoj (*niō*)[8].

## *Chūgū-ji*（中宮寺）

❖**skolo**: Konsciismo (*shōtoku-shū*)

❖**ĉefadorato**: Avalokiteŝvaro de Darma Rado[9]

❖**fondojaro**: 607 (?)

---

[8] vaĝrapano: neologismo. Gardanta dio kiu havas en sia mano *vajra*, diamantan armilon, por forpeli malbonon. En multaj tradiciaj temploj du figuroj de vaĝradaro, unu kun buŝo fermita kaj la alia kun buŝo malfermita, staras ĉe la ĉefa pordo. 金剛力士, 仁王


[9] sanskrite *cintāmaṇicakra* (*nyoirin-kannon*, 如意輪観音), unu el la avataroj de Avalokiteŝvaro. Estas kredo, ke Avalokiteŝvaro havas multajn avatarojn por montri sin en taŭga figuro al tiuj, kiuj postulas saviĝon.

❖**fondinto**: Princo *Shōtoku*

❖**historio**

En la komenco ĝi situis 400 metrojn oriente de *Hōryū-ji*. Poste en la fino de la 16a jarcento ĝi translokiĝis al la nuna loko tuj apude de *Hōryū-ji*. Kvankam detala cirkonstanco pri ĝia fondo ne estas klara, laŭ legendo, li fondis sep templojn, inter kiuj estas *Hōryū-ji* kaj *Chūgū-ji.* (Aliaj kvin estas: *Tachibana-dera, Hokki-ji, Kōryū-ji, Shitennō-ji,* kaj *Katsuragi-ji*; la lasta estas nun ruino.) Verŝajne Princo *Shōtoku* konstruis tiun ĉi templon sur la tereno, kie iam troviĝis palaco de lia patrino. Pro tio ĝi, kiel bikŝuina templo, havas la plej longan historion: pli ol 1300 jaroj.

❖**vidindaĵoj**



✓**Statuo de Bodisatvo en Meditado** (*Hanka-shiyui-zō*): Laŭ la oficiala historio de la templo, la ĉefadorato en la pozo sidanta kun dekstra piedo sur maldekstra piedo (nomata *hanka-huza*) kaj en meditado montras Avalokiteŝvaron de Darma Rado, sed laŭ scienca vidpunkto, ĝi ne estas Avalokiteŝvaro sed Majtrejo (*Miroku-nyorai*). La ministerio pri edukado kaj scienco nomumis la statuon nacia trezoro sen aludi nomon de la supozata bodisatvo. Ĉiuokaze oni diras, ke tiu ĉi statuo estas la plej elstara skulptaĵo de *Asuka*-epoko, kaj en la historio de japana arto ĝi okupas nepran lokon. Ĝia milda vizaĝesprimo aspektas kiel "arkaika rideto", eĉ komparebla kun *La Gioconda (Mona Lisa)*. Ĝia figuro en meditado rememorigas al ni la bronzan skulptaĵon *Le Penseur* (La Pensanto) de *Rodin*.

✓**Teksaĵa Mandalo de Sukavato** (*Tenjukoku-shūchō*): (vd. p.5 de tiu ĉi broŝuro.) Tiu ĉi konsistis el du pecoj, respektive 4m longa kaj 2m larĝa; estas tre valora kiel teksaĵo en *Asuka*-epoko. Nun restas nur fragmento, kies originalo estas konservata en la Nacia Muzeo de *Nara*, kaj la templo ekspozicias ĝian replikon.

# *Taima-dera*（當麻寺）

❖**skolo**: Mantrismo (*kōyasan-shingon-shū*) / Purlandismo (*jōdo-shū*)

❖**ĉefadorato**: Majtrejo, Mandalo de *Taima* (*Taima-mandara*)

❖**fondojaro**: 612

❖**fondinto**: Princo *Taima*

❖**historio**

Princo *Taima,* plijuna frato de Princo *Shōtoku*, fondis la templon por adori Majtrejon. Poste lia nepo translokis ĝin al la nuna loko.

Ĉirkaŭ la fino de *Heian*-epoko, kiam pli kaj pli furoris purlandismo kaj kredo al Amitabo, la templo fariĝis fame konata pro la Mandalo *Taima*.

Tial la karaktero de la templo ŝanĝiĝis laŭ la epoko: komence lekciejo de Ŝunjatismo; de post 824, kiam *Kūkai* (*Kōbō-Daishi*) sin ekzercis ĉi tie, Mantrisma templo; kaj pli poste Mantrismo kaj Purlandismo miksite.

❖**vidindaĵoj**

✓**Mandalo de *Taima***: Nacia trezoro. Teksaĵo, kiu desegnas scenojn de Sukavato (Purlando) surbaze de la priskribo en la Sutro de Amitabo-Kontemplado[10]. Kvankam la originalo ne estas publikigata, ĉar ĝi estas ege damaĝita, ĝiaj kopiaĵo farita el la sama maniero kiel la originalo estas publikigata en novembro. Cetere kelkaj pentraĵaj kopiaĵoj estas videblaj ĉiam ajn. Pri tiu ĉi mandalo, fama legendo rakontas ĉi tiel: dum la periodo de Imperiestro *Shōmu*, Princino *Chūjō* rigardante la scenon de sunsubiro al si kaptis vivecan imagon de Sukavato. Ŝi gvidate de avataroj de Amitabo kaj Avalokiteŝvaro plenumis la teksaĵon en unu nokto. Grandeco: ĉ. 4m x 4m.

✓**Mandala Halo** (*Hondō*/*Mandara-dō*): Nacia trezoro. Tabernaklo alta je 5m por meti la mandalon estas ankaŭ nacia trezoro. Metita estas ne originalo sed kopiaĵo.

✓**Centra Halo** (*Kondō*): En ĝi oni adormetas la statuon de sidanta Majtrejo el argilo, alta je 220cm, kiu estas nacia trezoro kaj la plej malnova elargila statuo. Ankaŭ la statuoj de la Kvar Gardantaj Dioj estas vidindaj; ordinare ili havas mienon koleran aŭ minacantan, sed tiuj ĉi statuoj

---

[10] Unu el la reprezentaj purlandismaj sutroj. 観無量寿経

montras trankvilan mienon, estante realisma kaj iom ekzotika.

✓**Orienta Pagodo** (*Tō-tō*): Nacia trezoro. Tri-etaĝa turo el japana cipreso. Konstruita en la fino de *Nara*-epoko. Konstrumaniero estas iom unika, ĉar la supra parto konsistas el 8 ringoj ornamaj, dum ĉe aliaj pagodoj 9 ringoj.

✓**Okcidenta Pagodo** (*Sai-tō*): Nacia trezoro. Tri-etaĝa turo el zelkovo. Konstruita en la komenco de *Heian*-epoko. Malsame kiel en aliaj pagodoj, ĉi tie relikvo de Ŝakjamunio estas metita ne subtere sed en la supra parto de la centra kolono.

## *Hōrin-ji*（法輪寺）

❖**skolo**: Konsciismo (*shōtoku-shū*)

❖**ĉefadorato**: *Baiŝaĵaguru* (*Yakushi-nyorai*)

❖**fondojaro**: 622 aŭ 670

❖**fondinto**: Princo *Yamashiro (Yamashiro-no-Ōe-no-Ō)*

❖**historio**

Laŭ unu biografio pri Princo *Shōtoku,* Princo *Yamashiro* fondis la templon por preĝi resaniĝon de sia patro (*Shōtoku*) en 622. Sed laŭ la aliaj biografioj, post la bruliĝo de *Hōryū-ji* tri monaĥoj el *Baekje* fondis ĝin. Arkeologia esploro montras, ke la tegoloj uzataj en la komenco de la templo estas preskaŭ malnovaj kiel tiuj de *Hōryū-ji* aŭ eĉ pli, kaj ke la aranĝo de konstruaĵoj estas sama kiel tiu de *Hōryū-ji*, sed kun 2/3 da larĝeco de la tuta areo.

❖**vidindaĵoj**

✓**Tri-etaĝa Pagodo**: Iam nacia trezoro, sed en 1944 pro tondro bruliĝis. La nuna estis rekonstruita en 1975, sub la gvido de *Nishioka Tsunekazu*, fama majstra arkitekto speciale por tradiciaj konstruaĵoj. Tiu ĉi pagodo kaj la aliaj du pagodoj en *Hōryū-ji* kaj *Hokki-ji* estis nomataj "la tri pagodoj de *Ikaruga*".

# *Hokki-ji (Hōki-ji)*（法起寺）

❖**skolo**: Konsciismo (*shōtoku-shū*)

❖**ĉefadorato**: Avalokiteŝvaro kun dek unu kapetoj

❖**fondojaro**: 638

❖**fondinto**: Princo *Yamashiro (Yamashiro-no-Ōe-no-Ō)*

❖**historio**

En la vilaĝo *Ikaruga* troviĝas kelkaj malnovaj temploj rilataj al Princo *Shōtoku*. Interalie konstruaĵoj de *Hōryū-ji* kaj *Hokki-ji* estas registritaj en Monda Heredaĵo de Unesko.

Princo *Yamashiro* estas filo de Princo *Shōtoku*. En tiu ĉi loko iam *Shōtoku* faris lekcion pri la Lotusa Sutro, kaj li testamentis al sia filo, ke li fondu templon ĉi tie. Ĉar la loko estis nomata *Okamoto*, tiu ĉi templo estis ankaŭ nomata antaŭe *Okamoto-dera*.

❖**vidindaĵoj**

✓**Tri-etaĝa Pagodo**: Nacia trezoro. Konstruita en 706. La plej malnova tri-etaĝa pagodo. 24m alta. Kvankam ĝi estis riparita kaj aliformita en *Edo*-epoko, okaze de la plej lasta riparo oni restaŭris ĝin al la originala formo.

# *Daian-ji*（大安寺）

❖**skolo**: Mantrismo (*kōyasan-shingon-shū*)

❖**ĉefadorato**: Avalokiteŝvaro

❖**fondojaro**: 639

❖**fondinto**: Princo *Shōtoku*

❖**historio**

Prototipo de *Daian-ji* estis la ekzercejo en *Heguri*, urbeto situanta nord-okcidente de *Nara*. Ĝi fariĝis unu el la grandaj ŝtataj temploj siatempe, kaj translokiĝinte en *Nara*, kaj oni nomis ĝin *Nandai-ji* (laŭlitere, suda granda templo). Ĝi fieris pri sia impona konstruaĵaro, kaj kune kun *Yakushi-ji* ludis la rolon de ŝtato-protektanta templo. Multaj eminentaj bikŝuoj restis tie ĉi, interalie *Hushō* kaj *Yōei*, kiuj estis alsenditaj al *Tang* (Ĉinio) por inviti

*Jianzhen*, *Bodhisena* el Hindio, *Dao-xuan* el *Tang*, *Buttetsu* el *Champa* (Vjetnamio). En la plej prospera tempo 887 da bikŝuoj loĝis en tiu ĉi templo, tiom pli ĝi kontribuis al prospero de budhismo en antikva Japanio. Post la translokiĝo de ĉefurbo al Kioto, ĝi iom post iom perdis sian prestiĝon kaj potencon. La nunaj konstruaĵoj estis rekonstruitaj en la moderna epoko, kaj la areo ankaŭ malgrandiĝis.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Hondō*): Kiel ĉefadrato la staranta statuo de Avalokiteŝvaro kronata per dek unu malgrandaj kapoj[11] estas instalita, kiu tamen kiel sekreta statuo malfermiĝas nur en oktobro kaj novembro. Ĉiu el la dek unu vizaĝoj esprimas ĝojon, malĝojon, koleron, kaj diversajn sentojn respondajn al popolaj sentoj, t.e. Avalokiteŝvaro havas la grandan kompaton kaj amikecon al viv-estaĵoj. Tiu ĉi statuo estas la plej eleganta el la skulptaĵoj reprezentante *Tenpyō*-eraon, la plej prosperan periodon de *Nara*-epoko.

✓**Halo *Inanaki*** (*Inanaki-dō*): La staranta statuo de Avalokiteŝvaro kronata per ĉevala kapo[12] estas instalita. Ankaŭ ĝi estas sekreta statuo kaj oni povas vidi ĝin nur en marto.

# ***Kōfuku-ji***（興福寺）

❖**skolo**: Konsciismo (*hossō-shū*)

❖**ĉefadorato**: Ŝakjamunio

❖**fondojaro**: 669

❖**fondinto**: *Fujiwara-no-Fuhito*

❖**historio**

En 669, *Fujiwara-no-Kamatari*, la kortegano plej fidata de Imperiestro *Tenji*, grave malsaniĝis. Pro tio lia edzino, Princino *Kagami*, konstruis la templon en *Yamashina* (nun en la gubernio Kioto), kaj preĝis resaniĝon de

[11] sanskrite *ekadaśamukha* (*jūichimen-kannon*, 十一面観音), unu el la avataroj de Avalokiteŝvaro.

[12] sanskrite *hayagrīva* (*batō-kannon*, 馬頭観音), unu el la avataroj de Avalokiteŝvaro.

sia edzo. La templo nomiĝis *Yamashina-dera*. Poste, kiam nova ĉefurbo estis farita en la regiono *Asuka*, ankaŭ la templo estis translokita en tiun regionon. En 710, kiam ĉefurbo estis nove farita en *Nara*, *Fujiwara-no-Fuhito*, filo de *Kamatari*, translokis la templon en la nunan lokon kaj nomis ĝin *Kōfuku-ji*.

*Kōfuku-ji* havis profundan interrilaton kun la Familio *Fujiwara*. Tiu familio havis la plej grandan potencon el nobeloj dum *Nara*- (710-794) kaj *Heian*-epoko (794-1192). La templon gravigis ne nur la Familio *Fujiwara*, sed ankaŭ imperiestroj. Ili konstruis grandajn konstruaĵojn por la templo. En *Heian*-epoko, la templo havis preskaŭ ĉiujn bienojn en la regiono *Yamato-no-kuni* (nuna gubernio *Nara*). Ankaŭ en postaj epokoj la templo regis tiun regionon.

Multfoje fajrego forbruligis konstruaĵojn. Oni fojfoje rekonstruis kaj ankoraŭ nun tio daŭras.

Post moderniĝo de Japanio, nova registaro konfiskis bienojn de la templo. Tiam la templo ege konfuziĝis. Pro klopodoj de koncernatoj, la templo nun estas en stabileco.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Chū-kondō*): Nun ĝi estas rekonstruata kaj provizora konstruaĵo staras. Ĝi estis centro de tiu ĉi templo. En 714 unuafoje konstruite, ĝi forbruliĝis 7 fojojn pro fajregoj de post 1046, sed ĉiufoje oni rekonstruis ĝin. Nuna rekonstruado estas pro ĝia kadukiĝo. En 2018 ĝi restariĝos en stilo de *Nara*-epoko. (Ekde la 20-a de oktobro laikoj povos eniri la halon.)

✓**Orienta Halo** (*Tō-kondō*): En 727, Imperiestro *Shōmu* konstruis ĝin preĝante resaniĝon de sia onklino, eksimperiestrino. Kelkajn fojojn ĝi forbruliĝis. La nuna estis konstruita en 1415. Ĝi havas statuon de Budho *Baiŝaĵaguru* (*Yakushi-nyorai*) kiel ĉefadoraton. Ĉirkaŭ ĝi estas kelkaj statuoj. Ili estas aldifinitaj kiel naciaj trezoroj aŭ gravaj kulturaĵoj.

✓**Norda Okangula Halo** (*Hokuen-dō*): La eksimperestrino *Genmei* kaj Imperiestrino *Genshō* konstruis ĝin en 721 preĝante por mortinta *Fuĵiwara-no-Fuhito*. Nuna konstruaĵo estis rekonstruita en 1180. Ĉefadorato estas Majtrejo. Ĉirkaŭ ĝi estas kelkaj statuoj aldifinitaj kiel naciaj trezoroj, inkluzive de *Asanga* kaj *Vasbandhu* (hindaj elstaraj bikŝuoj), kiuj estas precipe altetaksataj pro realeco.



✓**Suda Okangula Halo** (*Nan'en-dō*): *Fuĵiwara-no-Fuyutsugu* konstruis ĝin en 813 preĝante por sia mortinta patro. Nuna konstruaĵo estis rekonstruita en 1789. Ĉefadorato estas Avalokiteŝvaro. Kromaj kelkaj statuoj estas naciaj trezoroj.

✓**Kvin-etaĝa Pagodo** (*Gojū-no-tō*): La imperiestredzino *Kōmyō* konstruis en 730. La nuna estis konstruita en ĉ.1426. Ĝi estas 50m alta.

✓**Tri-etaĝa Pagodo** (*Sanjū-no-tō*): En 1143 tiama imperiestredzino konstruis. En 1180 ĝi estis pereita, sed baldaŭ rekonstruita.

✓**Muzeo de naciaj trezoroj** (*Kokuhō-kan*): Konstruita el ŝtalbetono. Ĝia aspekto imitas tiun de manĝejo de templo en *Nara*-epoko. Ĝi enhavas statuojn, pentraĵojn, metiaĵojn, manuskriptojn k.t.p. heredatajn en la templo. Multaj el ili estas aldifinitaj kiel naciaj trezoroj aŭ gravaj kulturaĵoj. Jen kelkaj el ili:

- **Statuoj de ok dioj**: Tiuj dioj gardas Budhon. Unue ili estis metitaj ĉirkaŭ la statuo de Budho Ŝakjamunio en Okcidenta halo. Inter ili, Asuro[13], kies statuo havas 3 vizaĝojn kaj 6 brakojn, estas precipe populara. Ili estis faritaj en *Nara*-epoko.
- **Statuoj de dek disĉiploj**: Disĉiploj de Ŝakjamunio. Ses statuoj nun restas. Faritaj en *Nara*-epoko.
- **Statuoj de vaĝrapanoj**: Gardantoj de Budho. Ili havas realecon de karnoj kaj dinamikaj movesprimoj. Faritaj en *Kamakura*-epoko.

[13] sanskrite *asura* (*ashura*, 阿修羅). En hinduisma mitologio, aro de diaĵoj serĉantaj forton, foje false stampitaj kiel demonoj. (el Vikipedio). En tradicia budhismo ĝia karaktero varias laŭ tempo kaj regiono. Foje ĝi estas simbolo de batalo - tiukaze la mondo de Asuro situas pli sube ol tiu de homo- , foje estas dio gardanta budhismon post pento pri la antaŭa vivo kiel batalanto. Ĉiuokaze Asuro neniam estas Budho nek Bodisatvo, tial estas erare nomi statuon de Asuro "budhostatuo".

# *Yakushi-ji*（薬師寺）

❖**skolo**: Konsciismo (*hossō-shū*)

❖**ĉefadorato**: La Triopo *Yakushi* (vd. la sekvantan paĝon)

❖**fondojaro**: 680

❖**fondinto**: Imperiestro *Tenmu*

❖**historio**

*Yakushi-ji* estis ekvotita de Imperiestro *Tenmu* en 680, kaj Imperiestro *Jitō* inaŭguris la statuojn en 697. En la erao de Imperiestro *Monmu* la konstruaĵoj estis kompletigitaj en *Asuka*. Kune kun translokado de la ĉefurbo en 710 en *Nara*, la templo translokiĝis al la nuna loko. En tiu tempo ĝi estis unu el la sep grandaj temploj en *Nara* kaj tiu granda templo fieris pri la plej grandioza belego en Japanio. La Centra Halo kaj la du Pagodoj estis konstruitaj laŭ la stilo nomata *Ryūgū* (Drako-Reĝa Palaco), karakterizata de pompa eksteraĵo. Kaj tia beleco absorbis la okulojn de la popolanoj.

De tiam pasis 1,300 jaroj. Dum tiu tempo multaj akcidentoj atakis ĝin. Precipe en 1528 la brulego cindrigis ĉiujn konstruaĵojn escepte de Orienta Pagodo.

En 1967 la estro de la templo, *Takada Kōin* ekvotis rekonstruon de la konstruaĵoj en la originala formo en la *Hakuhō*-erao.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Kondō*): Estas la bela konstruaĵo havanta duoble du etaĝojn, kvar flankojn kaj tegolitan tegmenton. Tiu ĉi estis konstruita laŭ la stilo *Ryūgū*. Legendo diras, ke la ornamaĵoj en la interno tiel belege brilis ore ke oni ne bezonis lampon.



✓**La Triopo *Yakushi*** (*Yakushi-sanzon-zō*): Centre situas Budho *Baiŝaĵaguru* (*Yakushi-nyorai*), dekstre la Bodisatvo *Suryaprabha* (*Nikkō-bosatsu*), maldekstre la Bodisatvo *Candraprabha* (*Gakkō-bosatsu*). Ambaŭflankaj du Bodisatvoj aspektas belaj kaj havantaj movon.

✓**Orienta Pagodo** (*Tō-tō*): Ĉi tiu Pagodo havas tri etaĝojn, kvankam ĝi aspektas havi ses etaĝojn, ĉar ĉiu etaĝo havas ornaman tegmenton (*mokoshi*) sur siaj flankoj. Ĉi tiu unika stilo tenas ritman belecon entute kaj estas nomata "Glaciĝita Muziko" kaj amata. La supra parto de la ringnaŭo havas kvar flamornamojn, en kiuj 24 flugdioj (*hiten*) estas aĵure gravuritaj.

✓**Okcidenta Pagodo** (*Sai-tō*): Ĉi tiu pagodo forbruliĝis dum la milito en 1528. Ĝi rekonstruiĝis laŭ la originala stilo en 1981. Okcidenta Pagodo luksa kaj Orienta Pagodo elteninta kontraŭ longjara vento kaj neĝo kune staras. Tio donas grandan impreson al vizitantoj.

✓**Granda Aŭditorio** (*Daikōdō*): Granda Aŭditorio estas 41m larĝa, 20m longa kaj 17m alta. Ĝi estas la plej granda konstruaĵo el ĉiuj, eĉ pli granda ol Centra Halo laŭ la regulo de antikva konstruaĵo, ĉar multaj bikŝuoj studantaj kolektiĝis en Granda Aŭditorio kaj recitis aŭ studis sutrojn. En la centro de Granda Aŭditorio la statuoj de Majtrejo kun aliaj du Bodisatvoj estis instalitaj. En la malantaŭa ĉambro troviĝas la ŝtono kun budha plandopremaĵo, la monumento kun utao pri ĝi, kaj ambaŭflanke la dek grandaj disĉiploj.

✓**Orienta Domo** (*Toin-dō*): Orienta Domo estis ekvokita kaj konstruita de Princino *Kibi* en la *Yōrō*-erao por preĝi por la ripozo de forpasinta Imperiestro *Genmei*. Ĝi forbruliĝis en 973 kaj estis rekonstruita en 1285. Ĝi estas la konstruaĵo de nacia trezoro. En *Nara*-epoko konstruaĵoj ordinare havis terplankon, sed ĝi havis tabulan plankon. Verŝajne zeno dum *Kamakura*-epoko influis la manieron.

✓**Statuo de Avalokiteŝvaro** (*Shō-kannon-bosatu-zō*): Tiu ĉi statuo ŝvebigas la noblecon kaj la elegantecon montrante la subliman figuron. Pendantaj haroj, la kolĉeno, vesto preskaŭ diafana, fingroj preskaŭ-moviĝantaj, kaj la rekta kaj senmova pozo; ĉi tiuj karakteroj estis influitaj de *Gupta*-dinastio *en Hindio*.

# *Kimpusen-ji*（金峯山寺）

❖**skolo**: Ŝugendo[14] *(kimpusen-shugen-honsū)*

---

14 Ŝugendo (修験道) estas neologismo ne trovata en PIV, sed "Vortaro Japana-Esperanta" alprenis tiun ĉi vorton.

❖**ĉefadorato**: *Zaō Gongen*[15]

❖**fondojaro**: la lasta duono de la 7a jarcento

❖**fondinto**: *En-no-Ozunu*

❖**historio**

De antikve japanoj konsideris montojn kiel sanktejojn kaj adoris ilin. *En-no-Ozunu* ekzercis sin en diversaj montoj kaj fondis Ŝugendon, kiu konsistas el ŝintoismo, esoterismo kaj taoismo. Li estis reala persono, sed laŭ legendoj li aktivis kiel magiisto.

En 2004 la centra halo kaj la granda pordo registriĝis en la listo de Monda Heredaĵo de Unesko.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Zaō-dō*): Nacia trezoro. En ĝi staras statuoj de avataroj de Ŝakjamunio, Avalokiteŝvaro kun mil brakoj[16] kaj Majtrejo. Ili estas altaj je 7m.

✓**Pordo de *Niō*** (*Niō-mon*): Nacia trezoro. Ambaŭflanke de la pordo staras du statuoj de vaĝrapano, 5m altaj.

✓**Sakuroj**: La montoj ĉirkaŭ *Kinpusen-ji* estas famaj pro siaj sakuroj. En printempo multaj vizitantoj ĝuas ilin.

## ***Oka-dera***（岡寺）

❖**skolo**: Mantrismo (*shingon-shū*, *buzan-ha*)

❖**ĉefadorato**: Avalokiteŝvaro de Darma Rado

❖**fondojaro**: ĉ. fino de la 7a jarcento

❖**fondinto**: *Gien*

❖**historio**

Iam ĉi tie troviĝis la palaco de Princo *Kusakabe*, filo de Imperiestro *Tenmu*. Poste sur tiu ĉi loko *Gien* fondis la templon laŭ la deziro de Imperiestro

---

[15] *Zaō* (蔵王) estas nomo de la monto en *Yamagata* gubernio. *Gongen* (権現) signifas avataron de Budho, Bodisatvo, aŭ dio. Unika adorato en Japanio.

[16] sanskrite *Sahasrabhuja*, japane *Senju-kannon.*

*Tenji*. *Gien* estis siatempe la plej prestiĝa monaĥo havanta multajn disĉiplojn, inter kiuj estas *Gyōki* kaj *Rōben*, ambaŭ kontribuintoj de *Tōdai-ji*.

Ĉar Gien estis la fondinto de japana Konsciismo, la templo apartenis al Konsciismo kiel branĉo de *Kōfuku-ji* ĝis Edo-epoko kaj poste fariĝis branĉo de *Hase-dera* de Mantrismo.

❖**vidindaĵoj**

✓**Pordo de *Niō*** (*Niō-mon*): Grava kulturaĵo. Rekonstruita en 1712

✓**Statuo de Avalokiteŝvaro de Darma Rado** (*Nyoirin-kannon-zazō*): La plej granda argila statuo en Japanio, alta je 4.85m. Cetere, ĝi estas unu el la "tri grandaj budhaj statuoj" en Japanio, kune kun la kupra statuo en *Tōdai-ji* (*daibucu*) kaj la ligna statuo en *Hase-dera*.

# *Tōdai-ji*（東大寺）

❖**skolo**: Girlandismo (*kegon-shū*)

❖**ĉefadorato**: Vajroĉano

❖**fondojaro**: 728

❖**fondinto**: Imperiestro *Shōmu*

❖**historio**

Kiam Imperiestro *Shōmu* estis sur la trono, epidemio disvastiĝis kaj katastrofoj okazis en la ĉefurbo *Nara*. Li pensis, ke budhismo utilas por solvi la malfeliĉan staton, kaj en 741 donis la edikton, kiu ordonas konstruadon de budhisma templo en ĉiu el 66 provincoj. Tiel fonditaj temploj por bikŝuoj estis nomataj *Kokubun-sō-ji*, kaj tiuj por bikŝuinoj *Kokubun-ni-ji*. *Tōdai-ji* estas la centra *Kokubun-sō-ji*, do la plej prestiĝa templo en antikva Japanio.

Krom Imperiestro *Shōmu* kaj la unua abato *Rōben*, la du majstroj havis grandan meriton por la fondo: *Gyōki* kiu estis la efektiva respondeculo por la fondo, kaj *Bodhisena* kiu venis el Hindio kaj gvidis la inaŭguran ceremonion.

La ĉefaj konstruaĵoj estis perditaj pro internaj militoj, akcidentoj aŭ katastrofoj. Kelkaj gravaj konstruaĵoj restas ruinaj: nome, lekcia halo, manĝohalo, orienta kaj okcidenta pagodoj.

❖**vidindaĵoj**

✓**Granda Suda Pordo** (*Nandai-mon*): Du-etaĝa, 25m alta. Ĉe ambaŭ flankoj staras du figuroj de vaĝrapano, kiu duope gardas la Budhon. Ĝi disfalis en 962 pro tajfuno, kaj la nuna pordo estis rekonstruita en 1203.

✓**Halo de Granda Budho** (*Daibucu-den*): La centra halo de la templo. Du fojojn brulfalis kaj la nuna halo estis rekonstruita en 1709, 2/3 malpli larĝitite, sed ankoraŭ la plej granda ligna konstruaĵo en la tuta mondo, laŭ volumo (57m larĝa, 50m longa, 49m alta).



✓**Granda Budho** (*Daibucu*): Tiu ĉi Budho estas nomata Vajroĉano[17], kiu origine signifas universalan lumon, nome simbolanta darmon, kaj pri kiu klarigas la Girlanda Sutro. La sida statuo ĉefe el kupro, orita, altas 18m kaj pezas 250t. La nuna estis rekonstruita en 1691, parte konservante la originalon en la kruroj k.a.

✓**Okangula Lanterno** (*Hakkaku-tōrō*): Tiu ĉi lanterno, situanta antaŭ la Granda Budha Halo restas en originala formo, ne

[17] Budho Vajroĉano (sanskrite वैरोचन) estas ĉiela Budho, kiu estas ofte interpretita, en tekstoj kiel la Girlanda Sutro, kiel la Darma Korpo de la historia Budho, Gotamo. En ĉina, korea kaj japana budhismoj, Vajroĉano estas rigardata kiel la enkorpiĝo de la budhisma koncepto de vakueco. En la formado de la kvin saĝecaj Budhoj de mahajana kaj vaĝrajana budhismoj, Budho Vajroĉano estas ĉe la centro kaj estas konsiderita prabudho. 大日如来, 毘盧遮那仏.

(el Vikipedio)

brulinta. La reliefigitaj figuroj de leonoj kaj muzikistaj dioj bone konservas tiaman arton.

✓**Sonorila Pavilono** (*Shō-rō*): La sonorilo, kiu estis uzata okaze de la inaŭguro de la templo, pezas 26.3t. Unu el la tri plej famaj sonoriloj en Japanio. Konata kiel ĝia longdaŭra sonorado.

✓**Halo de Lotusa Sutro** (*Hokke-dō*): Du konstruaĵoj estas kunligitaj; el ili *Shō-dō* estas la plej malnova konstruaĵo en *Tōdai-ji,* kaj *Rai-dō* estis konstruita en la *Kamakura*-epoko. Tial du malsamaj stiloj paralelas harmonie. Ĉi tie en ĉiu marto (*sangatsu*) laŭ luna kalendaro okazas lekcio pri la Lotusa Sutro (*Hokke-kyō*). Tial ĝi estas nomata ankaŭ *Sangatsu-dō.*

✓**Halo de Februaro** (*Nigatsu-dō*): En februaro (*nigatsu*) okazas granda kaj grava evento nomata *shu-ni-e*, aŭ pli konata kiel *omizutori*, kiu ekde la jaro 752 okazas ĉiujare sen interrompo, kaj kiu estas populara pro la torĉa procesio. La celo de la evento estas preĝi por paco kaj riĉa rikolto, kaj elektitaj bikŝuoj oferas akvon al la figuro de Avalokiteŝvaro 11-vizaĝa.

✓**Halo de Vinajo** (*Kaidan-dō*): *Jianzhen* (japane *Ganzin*), ĉina majstra bikŝuo, en 754 venis al Japanio por oficiale samganigi japanajn novicojn. Oficiala samganigo estas nomata *Ju-kai* (doni vinajon - budhisman disciplinon). Kiel la konstanta instanco por samganigo, la halo estis konstruita sub la iniciato de *Jianzhen*.

✓***Tegai-mon***: La pordo situanta nordokcidente de la Granda Budha Halo. Kiel unu el la konstruaĵoj postvivintaj de milita fajro, ĝi reprezentas la arkitekturon de la 8-a jarcento.

✓**Halo de la Malferminto** (*Kaisan-dō*): Konstruita en 1019 (poste translokita), memore al la Majstro *Rōben* (689-773), la unua abato de la templo. Malfermata al publiko nur en la 16-a de februaro, tago de lia forpaso.

✓***Shunjō-dō***: Konstruita en 1704, memore al la Majstro *Shunjō* (1121-1206), alinome *Chōgen*, kiu iniciatis la rekonstruon de la Granda Budha Halo. La konstruaĵo alprenis la arkitektan stilon de la ĉina *Song*-dinastio.

✓**Muzeo**: Havas 5 ĉambrojn, kiuj ekspozicias informojn pri la fondiĝo de la templo, skulptaĵojn, sanktajn skribojn, kaj arkeologiajn materialojn.

# *Hase-dera*（長谷寺）

❖**skolo**: Mantrismo (*shingon-shū*, *buzan-ha*)

❖**ĉefadorato**: Avalokiteŝvaro kun dek unu kapetoj

❖**fondojaro**: la dua duono en la 8a jarcento

❖**fondinto**: *Dōmyō*

❖**historio**

Oni ne povas scii klaran historion rilate la fondiĝon de tiu ĉi templo, sed almenaŭ en la mezo de la 9a jarcento, ĝi fariĝis ŝtata templo. Post la mezo de *Heian*-epoko ĝi populariĝis inter nobeloj, kiuj deziris profiton preĝante al Avalokiteŝvaro.

En la komenco ĝi apartenis al girlandismo, poste al konsciismo, kaj pli poste en la 16a jarcento al nova mantrismo[18]. Nun la centra templo de *buzan-ha*.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Hondō*): Nacia trezoro. Ĝi konstruiĝis en *Nara*-epoko kaj poste bruliĝis 7 fojojn. La nuna estas konstruita en 1588, kaj ankoraŭ pli poste pligrandigita. Tiu ĉi granda konstruaĵo konsistas el tri areoj: centra domo (kie la ĉefadorato estas metita), preĝa domo (por laikaj vizitantoj), kaj koridoro kunliganta la du domojn.

✓**Pordo de *Niō*** (*Niō-mon*): Rekonstruita en 1885

✓**Kvin-etaĝa Pagodo**: Anstataŭ forbruligita tri-etaĝa pagodo, nove konstruita en 1954.

✓**Pavilono de Ŝtuparo** (*Nobori-rō*): Longdaŭra ŝtona ŝtuparo el 300 ŝtupoj, kondukanta al la centra halo.

✓**Peonio**: En printempo multaj floroj de multspecaj peonioj floras. Pro tio tiu ĉi templo havas la alian nomon, "Templo de Floro" (*hana-no-mitera*). De la 14a aprilo ĝis la 6a julio okazas Festo de Peonio, kiun multaj turistoj vizitas.

[18] La japana mantrismo dividiĝas en du grandajn fluojn: tradicia mantrismo reprezentata de *Kongōbu-ji*, kaj nova mantrismo konsistanta el pluraj subskoloj, ekz. *buzan-ha, chizan-ha.*

# *Tōshōdai-ji*（唐招提寺）

❖**skolo**: Vinajismo (*ri-sshū*)

❖**ĉefadorato**: Vajroĉano

❖**fondojaro**: 759

❖**fondinto**: *Jianzhen* (*Ganjin*)

❖**historio**

*Jianzhen*, ĉina majstra bikŝuo, alvenis al Japanio en 754 invitite de la imperiestra kortego, post kelkfojaj malsukceoj kaj multege da mortoriskaj suferadoj, dume blindiĝinte pro malsano kaj jam aĝinte 66. Li unue restis en *Tōdai-ji*, kaj la kortego dume aranĝinte novan templon kaj donacis ĝin al li. La nomo "*Tō*"(唐) de *Tōshōdai* signifas *Tang*-dinastion de Ĉinio kaj "*shōdai*"(招提) devenis de la sanskrita vorto *cāturdiśa*, kiu signifas "homojn el ĉiuj mondopartoj". Tiel la nomo enhavas la spiriton de kosmopolitismo.

En la komenco la templo konsistis el kelkaj modestaj konstruaĵoj, ĉar ĝi celas instrui vinajon al novicoj. Iom post iom, disĉiploj de *Jianzhen* aranĝis imponajn konstruaĵojn. En *Heian*-epoko ĝi duone ruiniĝis pro malpopulariĝo de vinajo, sed en *Kamakura*-epoko *Kakujo* revigligis vinajon kaj la templon.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Kondō*): Nacia trezoro. El ĉiuj centraj haloj konstruitaj en *Nara*-epoko, tiu ĉi estas la sola, kiu restas en la originala formo ne bruliĝinte. Sur la tegmento troviĝas paro de ŝuformaj fiŝoj, ornamaĵo por preventi fajron, ĉar oni kredis, ke tia ornamaĵo havas magian forton eligi akvon. En la interna centro oni adormetas statuojn de Vajroĉano, *Baiŝaĵaguru*, Avalokiteŝvaro Milbraka *(senju-kannon)*, Kvar Gardantaj Dioj (*shi-ten'nō*), Brahmo, kaj Indro, kiuj estas ĉiuj naciaj trezoroj.



✓**Aŭditorio** (*Kōdō*): Nacia trezoro. La konstruaĵo estis transportita el parto de la imperiestra palaco de *Nara*-epoko, tial per ĝi oni povas konjekti, kiel estis konstruo

de la malnova palaco.

✓**Halo de Fondinto** (*Miei-dō*): Statuo de la fondinto *Jianzhen*, nacia trezoro, estas instalita, kaj ĝin ĉirkaŭas multaj fajnaj husumo-pentraĵoj fare de la fama pentristo *Higashiyama Kaii*, kiu laboris por tio 12 jarojn kaj kompletigis en 1981.

✓**Tambura Pavilono** (*Ko-rō*): Nacia trezoro, konstruita en 1240. Malgraŭ la nomo, efektive tie ĉi ne troviĝas tamburo, sed en la profundo estas metita relikvo de Ŝakjamunio (*shari*), kiun kunportis *Jianzhen* (temas pri relikvo legenda, ne pri aŭtentika). Tial ĝi estas ankaŭ nomata *shari-den*.

✓**Biblioteko** (*Kyō-zō*) kaj **Trezorejo** (*Hō-zō*): Ambaŭ malgrandaj konstruaĵoj sed naciaj trezoroj. Ili bone konservas la magazenan stilon de Nara-epoko nomatan *azekura-zukuri*, kontraŭ muso kaj humido. Biblioteko estas la konservejo de sutroj kaj aliaj sanktaj skriboj.

✓**Podio de Precepto** (*Kaidan*): Loko de ceremonio por doni preceptojn al novico. Oficiala ceremonio bezonas tri gvidantojn kaj sep atestantojn. Antaŭe konstruaĵo staris tie ĉi, sed post bruligo nun restas nur ŝtona podio. En 1978 oni nove konstruis pagodon *sanchi*-stilan (hind-stilan).

✓**Nova Trezorejo**: Konstruita en 1970, ŝtalbetona. En ĝi estas konservataj multaj statuoj, kiuj antaŭe estis en Centra Halo aŭ Aŭditorio. (Atentu, ke ĝi ne estas malfermata en somero kaj vintro.)

# *Saidai-ji*（西大寺）

❖**skolo**: Mantra Vinajismo (*shingon ri-sshū*)

❖**ĉefadorato**: Ŝakjamunio

❖**fondojaro**: 765

❖**fondinto**: *Jōtō,* Imperiestrino *Shōtoku*

❖**historio**

En 764 malkovriĝis ribelo de *Fujiwara-no-Nakamaro*, kaj Imperiestrino *Shōtoku* sukcese subpremis la ribelon. Kun sincera danko pro tio ŝi faris la statuojn de la kvar protektaj dioj kaj konstruis la templon *Saidai-ji* en la ĉefurbo *Heijōkyō* (*Nara*).

De post kiam ĉefurbo translokiĝis de *Nara* al Kioto en 794, *Saidai-ji* malprosperis iom post iom. En *Kamakura*-epoko *Eison* rekonstruis la templon kaj samtempe restarigis la vinajismon.

*Saidai-ji* (laŭlitere, okcidenta granda templo) situis okcidente de *Heijōkyō*, dum *Todai-ji* (laŭlitere, orienta granda templo) konstruita en 752 de ŝia patro, Imperiestro *Shōmu*, situis oriente de *Heijōkyō*. Ambaŭ apartenis al la sep grandaj temploj[19] en *Nara*-epoko.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Hondō*): En ĝi staras statuoj de Ŝakjamuio, Bodisatvo Majtrejo, Bodisatvo *Manjushri* kaj aliaj.

✓**Halo de Kvar Dioj** (*Shiō-dō*): En ĝi staras la statuoj de la kvar protektaj dioj faritaj de Imperiestrino *Shōtoku*.

✓**Teceremonio de Granda Taso**: Ĝi okazas tri fojojn ĉiujare. La partoprenantoj laŭvice trinkas teon en granda taso (7kg, 30cm diametre). Trinkanto ne povas trinki sen helpo de najbaroj. La ceremonio devenis de tio, ke en 1239 *Eison* oferis teon al *Hatiman*, ŝintoisma templo kaj donis ĝin ankaŭ al popolanoj, ĉar tiutempe teo estis tre kara medikamento. La partoprenantoj ĝuas teceremonion kaj sciiĝas pri graveco de kunlaborado.

# *Murō-ji*（室生寺）

❖**skolo**: Mantrismo (*shingon-shū*, *murōji-ha*)

❖**ĉefadorato**: Ŝakjamunio

❖**fondojaro**: ĉ. 770-780

❖**fondinto**: *Kenkei*

❖**historio**

De la komenco ĝis la meza epoko tiu ĉi templo havis la karakteron de seminariejo aŭ lernejo, kiu instruas al monaĥoj diversajn studobjektojn de budhismo, kiel branĉo de *Kōfuku-ji*（興福寺）. En 1694 ĝi sendependiĝis de *Kōfuku-ji* kaj fariĝis templo de mantrismo. La centra templo de japana mantrismo estas *Kongōbu-ji,* alinome *Kōyasan*, ĉar ĝi staras sur Monto *Kōya.*

[19] *Gangō-ji, Hōryū-ji, Daian-ji, Kōfuku-ji, Yakushi-ji, Tōdai-ji, Saidai-ji*

Dum *Kongōbu-ji* malpermesis al virinoj grimpi la monton kaj alproksimiĝi al ĝi dum longa tempo[20], kaj multaj aliaj mantrismaj temploj sekvis tiun ĉi regulon, *Murō-ji* preskaŭ sola faris escepton. Pro tio ĝi estas nomata *nyonin-kōya*, t.e. Monto *Kōya* por virinoj.

En 1964 ĝi sendependiĝis de *buzan-ha* kaj fariĝis la centra templo de *Murōji-ha*

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Kondō*): Nacia trezoro. Konstruita en *Heian*-epoko, poste riparita en *Kamakura*-epoko. En ĝi staras statuo de Ŝakjamunio (nacia trezoro) centre, kiun ĉirkaŭas Avalokiteŝvaro de dek unu kapetoj, Bodisatvo *Manjushri*, Budho *Baiŝaĵaguru*, Kŝitigarbo[21], kaj dek du diaj generaloj.

✓**Halo de Majtrejo** (*Miroku-dō)*: En ĝi staras statuo de Ŝakjamunio (nacia trezoro) dekstre de Majtrejo kiel ĉefadorato.

✓**Kvin-etaĝa Pagodo:** Nacia trezoro. Konstruita en ĉ. 800. Ruĝe kolorigita. La dua malnova pagodo post tiu de *Hōryū-ji*, kiel ligne farita pagodo.



✓***Abhiseka*** **Halo** (*Hondō* aŭ *Kanjō-dō*): Nacia trezoro. Kvankam ĝi estis konstruita multe pli poste en 1308 ol aliaj konstruaĵoj, ĝi estas nomata *Hondō* (centra halo), kio signifas ke la templo havas du centrojn. Tion kaŭzis la fakto, ke tiu ĉi templo siatempe fariĝis mantrisma aŭ esoterisma. Por esoterismo *Abhiseska* estas grava rito, en kiu guruo verŝas akvon sur kapojn de siaj disĉiploj en la sanktigita loko kie estas pentritaj mandaloj aŭ io simila.

---

[20] Tio ĉi estas diskriminacio kompreneble. Malpermeso en *Kōyasan* daŭris ĝis 1904. Kial estis malpermesite? Estas diversaj argumentoj pri tio, sed ĉie ni ne tuŝas ilin, pro manko de spaco.

[21] sanskrite *kṣitigarbha* (*jizō-bosatsu*, 地蔵菩薩) estas ofte rigardita kiel la bodisatvo de inferuloj, la gardanto de infanoj kaj patrono de forpasitaj infanoj kaj abortitaj fetoj en japana kulturo.

✓**Alpa Rozo**: Multaj turistoj vizitas tiun ĉi templon por vidi alpan rozon ĉi tie florantan en ĉiu aprilo.

## *Akishino-dera*（秋篠寺）

❖**skolo**: sendependa

❖**ĉefadorato**: Budho *Baiŝaĵaguru*

❖**fondojaro**: ĉ. 780 (?)

❖**fondinto**: *Zenshu*

❖**historio**

Oni ne scias precizan cirkonstancon pri la fondo de tiu ĉi templo. La fondinto *Zenshu* apartenis al la skolo de konsciismo, tial tiu ĉi templo en la komenco celis instrui konsciismon kaj mantrismon al bikŝuoj, kvankam ĝi iutempe apartenis al purlandismo. Ĉar ĝi situas proksime de *Saidai-ĵi*, ofte okazis konfliktoj inter la du temploj rilate terenon. En 1135 preskaŭ ĉiuj konstruaĵoj estis forbrulis.

❖**vidindaĵoj**

✓**Centra Halo** (*Hondō*): Rekonstruita en *Kamakura*-epoko, laŭ la japaneska stilo, kiu estis disvolviĝinta en *Heian*-epoko. Nacia trezoro. En la halo oni vidas la statuojn de la Triopo Yakushi, dek du diaj generaloj, Kŝitigarbo, Indro, kaj *Gigei-ten*[22]. Precipe la lasta estas bone konata, ĉar ĝiaj statuoj estas malmultaj en la tuta Japanio. Ĝia figuro fascinadis multajn art-amantojn; ekzemple *Hori Tatsuo*, japana verkisto, skribis en sia eseo: "Tiu ĉi statuo de Muzo estas precipe kara al ni, kvazaŭ ĝi estus nia [japana] propra diino."

[22] 伎芸天. Diino, kiu naskiĝis de Ŝivao. Gracia, belaspekta, kaj eminenta en dancado kaj ludado de muzikiloj. Pro tio ĝi estas populara inter dancistinoj kaj muzikistinoj. Ĝi ne troviĝas en sanskrita teksto.

## *Chōgaku-ji*（長岳寺）

❖**skolo**: Mantrismo (*kōyasan-shingon-shū*)

❖**ĉefadorato**: Amitabo

❖**fondojaro**: 824

❖**fondinto**: Imperiestro *Junna* kaj *Kūkai* (*Kōbō-Daishi*)

❖**historio**

En 824 Imperiestrino *Junna* votis konstrui la templon kaj *Kōbō-Daishi* realigis lian voton.

❖**vidindaĵoj**

✓**Granda Bildo de Narako**: 3.5m laŭlonge, 11m laŭlarĝe. *Kanō Sanraku* pentris ĝin en la fino de la 16a jarcento. Ĝi konsistas el 9 bildoj vivecaj de narako.
(Homo, kiu pekis per gravaj malbonaj agoj, ekzemple mortigo, enfalas en narakon. La bildo rakontas la scenojn, en kiu Jamao, la estro de narako kaj samtempe avataro de Kŝitigarbo, juĝas liajn faritajn pekojn kaj sendas lin al narako inda je liaj malbonoj. La gardistoj de narako torturas lin por ke li sciiĝu, kiel li faris malbonojn dum la vivo kaj aŭskultigas al li predikon de bodisativoj, por ke li fariĝu bonulo. Post longjara asketado li renkontas Amitabon kaj eniras en Purlandon.)

## *Chōgosonshi-ji*（朝護孫子寺）

❖**skolo**: Mantrismo (*shigisan-shingon-shū*)

❖**ĉefadorato**: Dio *Vaishravana*[23]

❖**fondojaro**: ?

❖**fondinto**: Princo *Shōtoku* (legende)

❖**historio**

Kiam Princo *Shōtoku* alvenis al tiu ĉi loko por militi kontraŭ *Mononobe* (vd. p.4) kaj preĝis por sia venko, aperis en la ĉielo Dio *Vaishravanam*, kiu

[23] sanskrite *vaiśravaṇa* (*bisyamon-ten*, 毘沙門天 aŭ *tamon-ten*, 多聞天) estas unu el la kvar dioj gardantaj Budhon en la kvar direktoj. *Vaiśravaṇa* gardas nordon.

gvidis lin al strategio de batalo. Tio ĉi estas tamen legendo; oni ne scias precizan historion de la templo. Kelkaj malnovaj rakontoj temas pri rilato inter Imperiestro *Daigo* kaj la templo. Fakte en 902 la imperiestro donacis al ĝi la titolon *Chōgosonshi*, kiu signifas: trankvilo de imperiestra sanktejo, gardi la landon, kaj prospero de futuraj generacioj.

**❖vidindaĵoj**

✓**Bildorulaĵo de Monto *Shigi*** (*Shigisan-engi*): Nacia trezoro. Unu el la famaj bildorulaĵoj klasikaj. Ĝi ĉefe temas pri mirakloj de la monaĥo *Myōren*, restaŭrinto de la templo. La originalo estas konservata en la Nacia Muzeo de *Nara*, kaj la templo ekspozicias ĝian kopion. Cetere tiu ĉi bildorulaĵo, kune kun la alia bildorulaĵo *Chōjū-jinbutsu-giga*, faras pratipon de la nuna japana kulturo de mangao aŭ bildliteraturo.

## listo de specialaj numeroj de "La Japana Budhano"

- 337号（2007年） Gvido al la Zena Templo Souĵi-ĵi（総持寺案内）
- 342号（2008年） Budho kaj Darmo（柴山全慶「仏と法」）
- 347号（2009年） Darmapado, aŭ Vortoj de Vereco（法句経）
- 352号（2010年） Memorlibro pri Herezoj en Lamentado（歎異抄）
- 357号（2011年） La Historieto de Japana Budhismo（日本仏教小史）
- 362号（2012年） La Admono kaj Vivo de Reĝo Aŝoko（アショカ王勅語）
- 367号（2013年） Budhismo el Tempo (1)（Tempo誌にみる仏教）
- 372号（2014年） Budhismo el Tempo (2)（同続編）
- 377号（2015年） La Sukhavativjuho（阿弥陀経）
- 382号（2016年） Invito al Budhana Esperanto-Movado（仏教エスペラント運動概観）
- 388号（2017年） La Samantha-Mukha-Parivarto（法華経普門品）

# Postparolo

Tiu ĉi broŝuro, speciala eldono por la dua Komuna Esperanto-Kongrso de Japanio kaj Koreio, temas pri la antikva urbo *Nara*, kie budhismo estis oficiale alportita el *Baekje* (nun Koreio). Memore al tiu ĉi kongreso ni Japana Budhana Ligo Esperantista (JBLE) decidis eldoni tiun ĉi broŝuron kaj donaci ĝin al ĉiuj kongresanoj. Por interesi multajn kongresanojn, ankaŭ nebudhanojn, ni uzis ĉ. du trionojn da paĝoj por informoj pri budhismaj temploj en *Nara*, kiuj ne nur havas religian kaj kulturan valorojn sed ankaŭ havas turisman ĉarmon. Kompreneble ĉi tie estis listigitaj nur tre limigitaj temploj. Oni povus alloge prezenti ankoraŭ dekojn da temploj, sed pro praktika kaŭzo ni devis rezigni tion.

La unua parto "Historieto de Budhismo en Antikva Japanio" estis verkita de mi YAMAGUTI Sin'iti, kaj la dua parto "Budhismaj Temploj en *Nara*" estis verkita de kvar membroj de JBLE: YAMAMOTO Osamu, MORIWAKI Yasumasa, YAJIMA Hiroshi, kaj YAMAGUTI. Traleginte la informojn pri la temploj, eble vi rimarkos la priskribojn ne ĉiam unueca. Mi kiel la redaktoro penis laŭeble unuigi fakajn terminojn, sed lasis stilon kaj manieron al bontrovo de respektivaj verkintoj.

Pri fakaj terminoj. Estas tre malfacile verki pribudhisman tekston, ĉar ankoraŭ nuntempe nesufiĉa estas faka terminaro de budhismo, kaj Plena Ilustrita Vortaro (PIV) alprenis nur limigitajn terminojn. Principe ni uzis vortojn kiuj sin trovas en PIV kaj ne uzis neologismojn, escepte de nur kelkaj okazoj, por ke legantoj povu kapti koncizan koncepton pli ol precizan sed malfacile kompreneblan esprimon. Ekzemple por esprimi iun skolon ni uzis "konsciismo"-n anstataŭ "viĵnjapti-matro"-n (el sanskrita *vijñapti-mātra*). Ĉi tie konsciismo ne nepre ekvivalentas al *vijñapti-mātra*. Sed ĉu indas alpreni neologismon ĉi tie? Mi tre dubas pri tio.

Japanio kaj Koreio havas politike tiklajn problemojn; estas iusence neevitebla fenomeno, ke najbaraj landoj havas malfacilaĵon kaj efektivan kaj mensan. Per tiu ĉi modesta broŝuro ni esperas, ke ambaŭlandaj esperantistoj konu la profudan kulturan tavolon kuŝantan inter la du landoj, precipe ĝian religian aspekton. Ni devus koni, ke por antikvaj homoj religio ne estis io simila al fasono, akcesoraĵo, aŭ kutimo, sed estis vivo mem.

(YAMAGUTI Sin'iti)

**Por plua informo:**
Se vi volas viziti iun el la listigitaj temploj ĉi tie, trovu oficialan retejon aŭ Google-mapon sur ĉi-suba TTT-paĝo, kiu estas alirebla per la dekstra rapidresponda kodo.
http://www001.upp.so-net.ne.jp/jble/nara_temploj.html

==========================================

**発行　eldonita de**
**Japana Budhana Ligo Esperantista**
Sidejo / **YAMAMOTO Osamu**
<zelkovo@m2.cty-net.ne.jp>
Sibagaki-tyô 10-14, Ôbaneen, Komono-tyô, JP-510-1242 Japanio
TTT-paĝo / http://www001.upp.so-net.ne.jp/jble/budhismo.html
2018.10.11

**編集　kompilita de**
山口眞一 YAMAGUTI Sin'iti

**校正　provlegita de**
山本修 YAMAMOTO Osamu, 盛脇保昌 MOROWAKI Yasumasa

**写真　fotoj** el Vikipedio

==========================================

## INVITO AL
## BUDHANA LIGO ESPERANTISTA (BLE)
## JAPANA BUDHANA LIGO ESPERANTISTA (JBLE)

Ĉu vi havas intereson pri budhismo? Se jes, bv. nepre kontaktiĝi kun BLE.

BLE, fondita en 1925, estas la sola internacia organizaĵo de budhanaj esperantistoj. Kaj JBLE, fondita en 1931, estas ĝia filio en Japanio.

Kontakt-adreso de BLE

**Yamaguti Sin'iti** (sekretario)

Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, Nagoya-si, JP-468-0026 Japanio

reta adreso: syam-z@wa2.so-net.ne.jp

Kontakt-adreso de JBLE

**Yamamoto Osamu**, vd. supre